# Ĉirkaŭ *Pola Radio*

## 3. SPECIMENAJ ELTIRAĴOJ

## 3.6. Fabela komponaĵo pri la mateno (dua parto)

(Ekzerco por aŭskulta kompreno)

El la libro *Gooŝ la ĉelisto* de Miyazawa Kenzi,
elsendita je 2003/07/19, legas Barbara Pietrzak.

## Taskoj:

***1) Bonvolu aŭskulti la sonmaterialon, elŝuteblan je la sekvaj adresoj:***

a) en formato MP3:
http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr12b.mp3

**aŭ**

b) en formato RealAudio:
http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr12b.rm

***2) Bonvolu rigardi la subajn demandojn kaj poste denove aŭskulti la elsendaĵojn. Post tio provu respondi al la demandoj***:

1. Kion faras la gardostaranto, dum la infanoj kuras raporti pri la trovitaĵo?
2. Kia estas la «konstruo»? Ĉu ĝi aspektas tute trankvila?
3. Kiu katastrofo poste okazis?
4. Kiun informon alportas la revenintaj infanoj? Kio fakte estis la konstruaĵo?
5. Kial ne estas bezonate registri la «konstruaĵon» en la landkarto (mapo)?
6. Kion ili poste ekvidas «tie transe»? Kiel ĝi aspektas?
7. Kio poste okazis kun la vetero?

**Demandoj pri la teksto (pripensado)**

8. Ŝajnas, ke la heroldo ne ludas gravan rolon en ĉi tiu fabelo? Imagu, kial ĝi tamen aperas.
9. Kiun signifon vi donas al la bruo, kiu aŭdiĝas tuj antaŭ la renversiĝo de la fungo? Imagu, kial ĝi renversiĝis.
10. Kiamaniere la aŭtoro sukcesas pentri al ni la gardostaranton kiel homon stultan kaj ridindan?
11. Kion vi opinias pri la laste menciita fungo, kiu estas «simila al fiŝosto», «lumanta malspirite» (malsprite?), «alprenanta branĉojn», «etendanta brakojn»?

**Daŭrigota.** Serĉu la sekvan parton!
Ni esperas, ke vi **ne bezonas** la solvojn! Se tamen, petu ilin ĉe
redaktanto@edukado.net kaj ni sendos ilin (almenaŭ tiujn, kiujn ni mem scias ☺).